

11-a JARO — No 7 (125)

NOVEMBRO 1933

ESTONA-LATVA No DE LA

INTERLIGILO

DE L'

P.T.T.

I



MC

Rec

Tiu

11-

AR

TE

abi

tad

köl

Sin

soo

KA

TE

ap

al

int

ple

mo

ESTONA-LATVA No.
DE LA
INTERLIGILO
DE L'P.T.T.

CENTRA ORGANO DE FAKINFORMOJ
FONDITA EN 1922
MONATA — INTERNACIA — TEKNIKA — ILUSTRITA
EN ESPERANTO

Redaktejo: Petro FILLIATRE, 324, Rue Lecourbe, PARIS XVe — Francio
Tiu ĉi nr. estas redaktita de s-roj J. Kallmann kaj J. Vahtkeri Tallinn, Estonio

11-a JARO — No 7 (125)

NOVEMBRO 1933

ARMSAD SÕBRAD, POSTI, TELEGRAAFI,
TELEFONI TEENIJAD KOGU MAAILMAS!

Käesoleva INTERLIGILO erinumbri ning selles avaldatud kirjelduste abil soovivad ja loodavad Teie Eesti sõbrad tulla Teile lähemale, kasutades selleks rahvusvahelist esperanto keelt, mille abil võivad läheneda kõik rahvad.

Meie vajame Teie sõprust ja poolehoidu ning hindame seda kõrgelt. Siin karemal, meile nii kallil põhjamaal, kanname meie eneste rinnus soojemaid tundeid kõigi kaasteenijate vastu kogu maailma viiel mandril.

Parimaid tervitusi Teile, saadab
EESTI P. T. T. TEENIJASKOND

KARAJ AMIKOJ, POŠT-TELEGRAF- KAJ
TELEFONISTOJ EN LA TUTA MONDO!

Pere de ĉi tiu speciala numero de INTERLIGILO kaj la priskriboj, aperigitaj en ĝi, viaj estonaj amikoj deziras kaj esperas pliproksimiĝi al vi, uzante por tio la internacian lingvon Esperanto, pere de kiu povas interproksimiĝi ĉiuj popoloj.

Ni bezonas vian amikecon kaj simpation kaj taksas ĝin alte.

Ĉi tie en la rigora, al ni tiom kara nordlando, ni portas en nia brusto plej varmajn sentojn al ĉiuj gekolegoj en la kvin kontinentoj de la tuta mondo.

Plej bonajn salutojn sendas al vi la
E S T O N A P. T. T. - I S T A R O


ESTIĜO DE LA ESTONA RESPUBLIKO

de JOH. KALLMANN * Tradukis J. TÜRŢN

Jarcentojn antaŭ la naskiĝo de Kristo migris el Azio trans Sarmatia ebenaĵo okcidenten Finn-Ugraj gentoj, inter ili ankaŭ estonoj. Atinginte la Finnangolfon, la finnoj ekloĝis norde kaj la estonoj sude de la golfo. Jam dum la vivo de Kristo la estonoj loĝis sur nuna loko. Ĝis 1200-a jaro p. K.

la estonoj estis sendependaj. La ŝtato kaj la sociordo same la kultura nivelo de estonoj estis en ĉefaj trajtoj similaj al tiuj de la aliaj popoloj de l'Eŭropo (germanoj, skandinavianoj k. a.)

Ĉirkaŭ la jaro 1000-a p. K., kiam la Ordenoj aranĝadis kruemilitojn por konkerti teritoriojn kaj por propagandi kristanan religion, tiam atakis la Teŭtona Ordeno



Sur la karto mankas 2 novaj fervojoj

venkintoj sklavigis la indiĝenojn. Potenculoj iĝis germanaj kavaliroj, ordenmajstroj kaj pastroj. Dum sekvintaj jarcentoj Estonlando estis ripete militejo. Krom la ordenoj regis Estonlandon kaj ĝian popolon alterne svedoj, danoj, poloj kaj rusoj ĝis la komenco de la 18-a jarcento, kiam Estonlando subiĝis porlonge al rusa potenco. Ĉiuj fremdaj potencoj aĉe traktis la indiĝenojn — estonojn.

Dum la rusa tempo la rusigado estis tiom forta, ke ankaŭ en la elementaj lernejoj estis malpermesite al infanoj paroli sian gepatran lingvon.

Sed malgraŭ la premo de rusigado evoluis la naciemo kaj nacia kulturo de estonoj kaj samtempe ankaŭ la emo al ŝtata sendependeco. La rusan revolucion en 1917 salutis la tuta Estonlando. La provizora registaro de Rusujo eldonis la 12. apr. 1917 specialan dekretan pri aŭtonomio; sur ĝia bazo kunvenis Estonlanda Konsilantaro. Komence la Konsilantaro celis nur aŭtonomion por Estonio. En Rusujo la registaro de Kerenski estis renversita la 25.X.1917 kaj la tutan potencon akiris Lenin kaj lapartio de bolŝevikoj (komunistoj). Ili malpermesis la kunvenon de la Konstituanta Reprezentantaro kaj proklamis Rusujon Respubliko de Socialistaj Konsilantaroj (Sovetrespubliko). En Rusujo ekestis grandaj malordoj kaj



Arbaro en Estonio

KO

land-
l'Balta
onker-
lokajn
ndajn
livojn
nojn.

la es-
olo sin
inten-
a kont-
tis mil-
pli bo-
ta kaj

a kon-
a tuta
do de
anoj la
Potenc-
ajstroj
Eston-
orden-
opolon
soj ĝis
am Es-
otenco.
a indi-

asigado
la ele-
esite al
ngvon.
asigado
kulturo
kaŭ la
rusan
a tuta
gistar
r. 1917
nomio;
nlanda
lantaro
Estonio.
erenski
kaj la
in kaj
toj). Ili
Kons-
prokla-
ialistaj
o). En
doj kaj


revoltoj. La Rusujo malfortiĝis interne tiom, ka la Estonlanda Konsilantaro ne povis preparoli kun Rusujo la demandon de aŭtonomiigo de Estonio. En la sama tempo la rusa bolŝevika registaro faris provizoran interpacon kun Germanujo rezignante pri sia suvereneco pri Baltlando.

Dum la interpaco Germanujo, profitante malfortecon de la Sovetunio, okupis Baltlandon — Latvujon kaj Estonion. En Estonio estis granda malordo, la bolŝevikaj armeoj foriradis, la germanaj imperiestraj armeoj persekutis ilin. Sed tamen la Savkomitato, nomita de la Estonlanda Konsilantaro, sukcesis proklami, antaŭ la enmarŝo de germanoj armeoj, Estonion sendependa respubliko.

La manifesto pri sendependeco estis proklamita la 24. II. 1918, sed jam la 25. II. t. e. la sekvintan tagon la germanaj militistoj enmarŝis Tallinn'on (ĉefurbo) kaj la Registaro de Estonio tute ne povis ekfunkcii. Oni ne povis ankaŭ aranĝi elektojn por Konstituanta Reprezentantaro, antaŭviditajn en la manifesto pri sendependeco.

Malgraŭ tio, ke en la hejmlando la agado de la Estona Registaro estis malpermesita kaj malhelpita, la Reprezentantaro dissendis jam antaŭ la enlandiĝo de germanoj siajn delegitojn al eksterlando. Ili celis faktan (de facto) agnoskon de Estonio. Jam en marto 1918 la registaroj de Francujo kaj de Anglujo (poste ankaŭ Italujo) deklaris, ke ili agnoskas Estonion fakte. Kiam pro packontrakto de Versailles la germanaj armeoj forlasis Baltlandon, tiam (la 11. XI. 1918) la Estonia

Provizora Registaro ekagis. Tiam komenciĝis milito kontraŭ Rusujo. La rusaj militistaroj enpenetris Estonion laŭgrade de la foriro de germanoj, volante aranĝi komunistan ordon en Estonio, similan al tiu en Rusujo. La milito kontraŭ Rusujo postulis de la estiĝanta Estonio grandan fortostreĉon. Tamen Estonio venkis kaj la 2.II.1920 estis subskribita en Tartu la Eston-rusa Packontrakto. — Dum la liberemilito estis efektivigitaj elektoj por la Konstituanta Reprezentantaro. La 23.IV. 1919 kunvenis la Estonia Konstituanta



Tallinn — Viru-pordego kaj Viru-strato



Bieneto
en Estonio

Reprezentantaro kaj proklamis definitive Estonion sendependa respubliko. La Konstituanta Reprezentantaro la 15.VI.1920 akceptis la Konstitucion, kiu ekvalidis la 20.II.1920. Akceptinte ankoraŭ aliajn necesajn leĝojn, la Konstituanta Reprezentantaro perdis siajn rajtojn per ekvalido de la Konstitucio. Je la sama tempo aliaj ŝtatoj agnoskis jure la sendependecon de Estonio. Kaj per tio Estonio iĝis plenrajta membro en la familio de aliaj ŝtatoj.

Post fino de la milito komenciĝis granda interna rekonstrulaboro.

La plej grava reformo estas la agrarreformo. Estis ekspropritaj ĉirkaŭ 1.300 bienoj kaj 171 terposedaĵoj kun 1.500.000 hektaroj da agrikultura areo, 663.087 ha da arbara areo kaj 26.811 ha da alia areo, sume ĉirkaŭ 2.200.000 ha. La areo de Estonio estas 4 379.583 ha.; el tio agri- kaj ĝardenkultura areo 1.024 845 ha aŭ 23,5%, herbejoj — 1.052.957 ha aŭ 24%, paŝtejoj — 743.063 ha aŭ 17%, arbaroj 898.279 ha aŭ 20,5%, marĉoj kaj netaŭgaj areoj 660.439 ha aŭ 15%. Komparante tutan areon kun la areo eksproprita for de bienegposedantoj (4.379.583 ha kaj 2.200.000 ha), ni vidas la gravecegon de la agrarreformo. Sur ekspropritaj areoj oni kreis 52.300 novajn bienojn. Estas kreotaj ankoraŭ 11.716 novbienoj. Per etbiena leĝo oni aldonis areon al 2.000 etbienoj. La dua el plej gravaj reformoj estas la validigo de la deviga 6-klasa (-jara) elementa lernejo. (Dum rusa tempo estis devigaj 3 klasoj.) Tio postulis de la ŝtato grandajn elspezojn, novajn instruistojn, novajn lernejdomojn ktp. Ankaŭ la nombro de mezlernejoj pligrandiĝis; same oni kreis novajn faklernejojn kun agrara kaj aliaj programoj.

Dum la sendependeco granda progreso estas atingita en la kampoj de agrikulturo, de vojoj (plibonigoj), de fervojoj (novkonstruoj, ktp.

15 jaroj da memstara ŝtatvivo montris al estona popolo, ke ĉi-epokaj atingiĝoj superas la atingiĝojn de iu ajn alia samlonga epoko sub fremda potenco kaj tial la estona popolo taksas kara, alta kaj grava la ŝtatan sendependecon.

GEKOLEGOJ! Konigu tiun ĉi numeron al p. administracioj, estraroj de p. t. t.-istaj organizaĵoj, redakcioj de iliaj gazetoj kaj laŭeble al multaj samfakanoj!

ESTONA P. T. T.

HISTORIO, ORGANIZO KAJ STATISTIKO

V. SILLA

I.

Ĝi ne estas tre granda, ĉar ĝi devas priservi nur malmultnombran loĝantaron de etŝtato — 1.150.000 homojn sur surfaco de 37.191 km² da kulturebla tero. Malgraŭ tio la agado kaj taskoj de la estona poŝto estas eĉ tre viglaj kaj multflankaj, ĉar oni devas priservi civilizitan loĝantaron. La Estona Respubliko situas ja ĉe la limo, kie kunpuŝiĝas la Orienta kaj la Okcidenta civilizacioj, en Nord-Eŭropo, ĉe la orienta bordo de Balta Maro, — en la tiel nomata „malnova kultura Baltikumo“ (en geopolitika Baltoskandio). El tiel nomataj „limŝtatoj“ aŭ „bordŝtatoj“ Estonio estas unu el plej malgrandaj. Ĝia ĉefurbo estas Tallinn (en fremdlingvoj ankaŭ Reval) kaj ĝia universitaturbo estas Tartu (en fremdlingvoj Dorpat).

La Estona P. T. T. kreigis nur la 13-an de novembro 1918, ĉar nur tiam forigis el la lando okupacia potenco, kaj nur tiam ekdaŭrigis sian agadon la ĝis tiam sin kaŝinta Registaro de la Respubliko.

La mondmilito, la rusa revolucio kaj la germana okupacio estis aĉigintaj, detruintaj, forveturigintaj kaj disigintaj la havaĵojn kaj ilojn de P. T. T. en Estonio — en tiama rusa limprovinco. Same estis disjetita la P. T. T. organizaĵon tiel dirante el nenio. Tio dum tempo kiam la lando komencis la faman fortostreĉan batalon por sendependeco — la liberecmiliton, kiu daŭris je kelkaj frontoj preskaŭ 1 1/2 jarojn.

La kreo kaj evoluigo de la estona P. T. T. daŭris vigle dum ĉi-tutaj 15 jaroj kaj eble nur nun ĝi estas atingonta la finon.

II.

Laŭstrukturo la estona P. T. T. konsistas el la gvidanta centro — Ĝenerala Poŝta Direkcio, kiu dependas senpere de la Trafikministerio, kaj el p. t. t.-oficejoj, kiuj senpere dependas de la Ĝenerala Poŝta Direkcio. En la strukturo de la Ĝenerala Poŝta Direkcio validas la decerna principo, t. e. la efektivaj gvidantoj de laborfakoj (9) interrilatas senpere kun la direktoro, kio ebligas rapidan afergvidadon.

Ĉe la kreo de la p. t. t.-oficejaro oni celis la principon, ke ĉiu ŝtatano, en

urboj ka en kamparoj, havu p. t. t.-punkton meznombro ne pli malproksime ol en distanco de 1 km. Ĉi tiu p. t. t.-oficejaro estas nun preta. Plejparte ĝi konsistas el help-oficejoj de malmultekosta tipo, havantaj limigitajn operaciojn (agentejoj k. a.). La helpoficejoj situas ĉirkaŭ normaltipaj ofic-

aliaj, ŝtataj kaj komunumaj, oficejoj (plejparte sekretarioj de komunumoj) aŭ privatuloj kontraŭ malgranda pago; la priservo de poŝtpunktoj kaj telefonpunktoj, okazas kontraŭ nuraj favoraĵoj, kiujn pretigas la ŝtato per ŝtatkostaj instalaĵoj de la telefono kaj hejmenigo de la poŝtaĵoj.



S-ro H. Rikand, organizinto de poŝto en Estonio kaj unua direktoro de p. administracio (Pri malfacila tasko de organizado legu „La Interligilon“ nr. 79-80 jaro 1928). Nun li ne estas plu en poŝta servo. De jaro 1928 li estas Esperantisto kaj nun jam la trian jaron Esp. instruisto en Cseh-metodaj kursoj



S-ro ing. G. Jallajas, nuna direktoro de la Estona p. t. t. Ĝenerala Direkcio.

ejoj, kaj laboras sub la gvidado kaj kontrolo de la lastaj.

La 1.IV.33 ekzistis: 123 normaltipaj p.t.t.-oficejoj, 637 agentejoj, 2732 poŝtkolektejoj (plejparte en bienoj), 205 apartaj telefonparolpunktoj; sume en la tuta lando ekzistis 3440 poŝtpunktoj (en 1920 estis 199, en 1925—691), 606 telegraf-punktoj (en 1919 — 107, en 1925 — 127) kaj 1499 telefonpunktoj (en 1919 — 109, en 1925 — 361). Do meze estas:

po ĉiu poŝtpunkto	10,8 km ²	da areo	kaj	322 loĝantoj,
„ „ telegraf „	61,2 „ „ „	„	„	1826 „
„ „ telefon „	24,5 „ „ „	„	„	730 „

La estona P. T. T. havis nur 144 etatajn (de la personaro de la P. T. T. priservatajn) oficejojn nome: suprenominitajn 123 normaltipajn p. t. t.-oficejojn kaj 21 specialtaskajn oficejojn (radistacioj, konstruoficejoj de telefon-telegraf-linioj, materialejoj k. a.). La agentejojn priservas la oficistoj de

III.

La laborprocedon oni penis organizi kiel eble plej racie kaj moderne. Inter alie jam ekde la jaro 1924 validas por ĉiuj etataj oficejoj labornormoj. Tiel la personaro de la estona P. T. T. estas en fiksa rilato kun la kvanto de la laboro kaj estas kalkulata, laŭ la statistikaĵoj pri la laborkvanto de la antaŭa jaro, por la sekvonta jaro. En la validigitaj labornormoj la sendaĵoj, la operacioj kaj ĉiaj laboroj estas esprimataj en laborunuoj. La laborunuo egalas al ĉirkaŭ 10 laborsekundoj. Por ĉiuj 750.000 jaraj laborunuoj oni kalkulas po unu laborpersonon kaj certan procenton da gvidantaj personoj.

En la okazo de ŝparo de salajro per plenumo de la laboro en p. t. t.-oficejoj per malpli personaro ol laŭnorma la p. t. t.-istoj ricevas kroman rekompencan egalantan al 50% de la ŝparsalajro. Aliajn 50% profitas la ŝtato.

Nun oni normas ankaŭ la laboron kaj personaron de la Ĝenerala Poŝta Direkcio,

sed tio estas en eksperimenta stadio. La efektiva personaro de la Ĝenerala Poŝta Direkcio estas 66 personoj, kio egalas al 40% de la personaro de la etataj oficejoj; se kunkalkuli la personaron de helpoficejoj kaj la sezonajn laboristojn, la % malpliigas ĝis 2

Ĉiuj leĝoj, dekretoj kaj preskriboj kaj gvidlibroj, necesaj por la servoj kaj laboroj de l' P. T. T. estas kunmetitaj kaj validigitaj dum ĉi 15 jaroj.

IV.

Finance la estona P. T. T. laboras kun profito (kiun ĝuas la ŝtato), kvankam la lastaj agadjaraj pasis en la medio de ĉiam grandiganta ekonomia krizo. Kompare al la 1931/32-a agadjararo en 1932/33 la spezoj de l' P. T. T. estis malpliaj je 10% kaj la nombro de sendaĵoj, de telegramoj, de telefonadoj kaj de operacioj malkreskis je 5%. Sed oni malpligrandigis ankaŭ elspezojn kaj la P. T. T. donis al la ŝtato 854.357 kr. (1 kr. egalas al 1,39 Sv. frankoj; depost 28.6.33 egalas al ĉirkaŭ 0,90 Sv. fr.) da enspezo; krom tio ĝi havigis al si havaĵojn en la valoro de 296.203 kr. Se eĉ subtrahi havaĵ- kaj operaci-kapitalan %-%-ojn, restas tamen 236.688 kr. da pura profito por la ŝtato.

Ĉe tio la tarifoj estas kaj ĉiam estas estintaj relative malaltaj, ekz. la afranko de la enlanda letero (ĝis 20 gramoj) kostas 10 cendojn (= antaŭ 28.6.33 — 14 Sv. centimoj; poste — 9 Sv. cent.). Nur telefonaj tarifoj estas altaj, ĉar pro la maldenseco de la loĝantaro la meza longeco de la telefonlinioj estas granda kaj kaŭzanta grandajn instalelspezojn, kaj ĉar, aliflanke, la nombro de telefonabonantoj estas malgranda. Poŝto kaj telefono estas profitdonaj, sed la telegrafo laboras de l' jaro al jaro kun pliiganta deficitto kaj degeneras — pro triumfo de la telefono.

El la elspezaro de l' P. T. T. la plejparton konsistigas la salajroj de p.t.t.-istoj kaj la sumoj por oficeveturoj, subtenoj kaj ekipoj. En 1932/33 ili konsistigis 57,8% de la elspezaro. Ni scias, ke en pluraj aliaj landoj ĉi-% estas eĉ pli granda, sed ni ne povas sekvi la modelon de ĉi-landoj, ĉar ni devas proprarime ĝiskonstrui kaj perfektigi la organizaĵon, kiu dum rusa tempo estis malzorgata kaj malmoderna. La 1.IV.33 la valoro de la havaĵaro de l' P. T. T. estis 11.273.400 kr. kontraŭ nur 29.795 kr. la 1.I.20.

El 144 etataj oficejoj 41 oficejoj troviĝas en propraj domoj de l' P. T. T., 72 oficejoj

en luataj privatomoj kaj la restantaj oficejoj — en fervojaj stacidomoj aŭ en ŝtato-oficejoj aŭ komunumoficejoj domoj. Kie lupagon de privataj domoj oni elspezis en 1932/33 60.546 kr. Rilate al helpoficejoj oni sukcesis aranĝi, ke iliaj ejoj, hejtado kaj lumigado estas senkostaj al la P.T.T.

V.

La efektiva personaro en la etataj oficejoj (144) de la estona P. T. T. konsistis en la fino de 1932/33 el 1706 homoj, kunkalkulante Ĝeneralan Poŝtan Direkcion. El ili estis viroj 1229 kaj virinoj 477. La virinoj servas kiel oficistinoj kaj konsistigas tutajn 43,5%-ojn de la personaro de la direktoj kaj de la ekspluatfako. Oni ne miru pri ĉi rilato, ĉar la nombro de virinoj estas en nia lando pli granda ol la nombro de viroj. Dum la milito la P.T.T. dungis la virinojn pli volonte, kaj pro la alta nivelo de la virinara kleraro la virino konkuras ĉe ni sukcese kun viroj en ĉiaj profesioj.

El etataj oficistoj (1141) havas akademian kleron 1,6% (viroj el nur viroj 2,3%), mezlernejan kleron 26,5% (virinoj el nur virinoj 36,5%). Aliaj oficistoj, same muntistoj kaj leterportistoj havas altelement- aŭ elementlernejan aŭ hejman kleron.

La p.t.t.-istoj ricevas ĉiujare 1-monatan liberton. La kuracado estas grandparte ŝtatkosta (P.T.T.-kosta). La P.T.T. elspezas jare por kuracado, por medikamentoj, por naskoj kaj kiel enterigsubtenon al p.t.t.-istoj popersone 20 kr. La meza nombro de mankotagoj pro malsanoj estas 6,8 po p.t.t.-isto. Ĉe tio la popersona mankotagaro de virinoj superas la popersonan viran mankotagaron je 30%. Se oni kalkulas ankaŭ la mankotagojn pro naskoj la supero altiĝas ĝis 77,7%.

Krimagoj kaj koruptoj okazas en la P.T.T. malofte. En 1932/33 estis 3 okazoj; la ŝtata malprofito estis 111 kr. En la helpoficejoj estis 7 okazoj de krimagoj.

VI.

Jen ankoraŭ statistikaĵoj pri estona P.T.T. el 1932/33:

Ĉiuspecaj korespondendaĵoj — 38 milionoj; el ili leteroj 20,5 milionoj, registritaĵoj 1,1 milionoj; gazetoj kaj ĵurnaloj 20 milionoj; poŝtpakaĵoj 113.000 (1931/32 — 155.000). Poŝtmandatoj 596.000, telegrafmandatoj 8.000, sume 604.000 en la valoro de 15 milionoj da kr. Valorleteroj kaj -pakaĵetoj 235.000 en la valoro de 21 milionoj da kr. Postpagsendaĵoj 40.000 kun

postpaga sumo de 500.000 kr. Sumo 58 milionoj (62 milionoj en 1931/32). Akceptitaj abonoj de gazetoj kaj ĵurnaloj: enlandaj 118.000; eksterlandaj 8.000. Rapid-sendaĵoj: enlandaj 4200, al eksterlando — 4.000, el eksterlando 6.500. Interŝanĝitaj aerpoŝtaĵoj (nur internacie) 28.000 (je 22,3% malpli ol en 1931/32), kun la pezo de 1.500 kg.

Poŝtaj ĝirokontoj 455, la nombro de operacioj 121.000, transigita sumaro 18 milionoj da kr., la havaĵsaldo de kontposedantoj la 31.III.33 0,4 milionkr.

Enkasigadoj — 211 en la valoro de 5.570 kr., neenkasigoj — 279 sendaĵoj.

La akceptoj de ŝtatimpostoj 18.000 — 723.000 kr.; operacioj de ŝtatsparkaso 6.300—700.000 kr.

Hejmenigitaj poŝtaĵoj 18,6 milionoj, el ili ordinaraĵ sendaĵoj 18 milionoj, rekomenditaĵoj kaj alpagajoj 0,5 milionoj, valorleteroj 2365, poŝtmandatoj 81.069, rapid-sendaĵoj 13.000.

Nompoŝtkesto 4.710, kien oni elpoŝtigis pli ol 9 milionojn da sendaĵoj.

Poŝtvojoj	ŝoseaj 13.031 km,	veture	5 milionkm.)*
	fervojaj 1.616,5 "	pasigita	1,4 "
	akvaj 457,3 "	distanco	0,169 "

Poŝtmarkoj venditaj por 21,5 milionkronoj.

Lokaj telefonparoloj — 16 milionoj, enlandaj paroloj 2,2 milionoj, eksterlandaj (19 eŭropaj landoj) 75.000.

Telegramoj enlandaj — 83.000, eksterlandaj (tien kaj de tie) — 134.000 kaj transite 19.000. La interŝanĝo de telegramoj kun eksterlando okazas je 50% radie (Haapsalu — Nõmme kaj Kopli).

Radiabonantoj: detektoraj 4.185, tubaparataj 10.569.

La longeco de telefonlinioj (kun ter- kaj akvokablo) 11.722 km, la longeco de dratoj 121.702 km.

Nombro de telefonabonantoj 15.385, el ili en urboj — 9.744. Parolpunktoj 17.437, el ili publikaj 1.499, ĉefaparatoj 13.661 kaj aparatoj de hejmaj centroj kaj kromaparatoj 2277. La poparolpunkta nombro de loĝantoj 63,5 (1919—503) aŭ 1,6 parolpunktoj po 100 loĝantoj.

La longeco de nurtelegrafaj linioj 722,5 km + komunaj (kun telefono) linioj 3446 km, land- kaj markabloj 186,5 km, la longeco de nurtelegrafaj dratoj 909 km.

*) Por tio la P. T. T. pagis al dungitaj privataj daŭrveturigantoj kaj al veturstacioj 260.000 kr. Krom tio parto de la poŝto estis veturigata je la kosto de distriktaj komunumaroj — 964.000 km, kaj per personveturigaj omnibusoj — 1,4 milionkm. En la limoj de la urboj la kunveturigo kaj disveturigo de la poŝto postulis 270.000 km da veturo.

P.T.T.-ISTA FAKA ORGANIZAĴO EN ESTONIO

J. KALLMANN * Trad. J. VAHTKERL

Estona p. t. t.-ista faka organizaĵo estas fondita en 1919, do kelkajn monatojn post estiĝo de la Estona Respubliko. Dum unuaj jaroj la nombro de la anoj estis malgranda, ĉar malgranda estis ja ankaŭ la nombro de p. t. t.-istoj, ĉar la P. T. T. estis ankoraŭ en organiza periodo. Dum jaroj la agado de P. T. T. evoluis kaj pligrandiĝis kaj depende de tio pligrandiĝis ankaŭ la nombro de p. t. t.-istoj. Dek jarojn post la fondo de la P. T. T., t. e. en 1929 estis entute 1500 p. t. t.-istoj kaj el ili en urboj estis organizitaj 95%. Nun estas organizitaj 90% el la tuta p. t. t.-istaro.

Ĝis 1931 ĉiuj p. t. t.-istoj, t. e. oficistoj, leteristoj kaj teknika personaro (inĝenieroj, teknikistoj, mekanikistoj, muntistoj kaj majstroj) apartenis al unu kaj la sama organizaĵo, sed en 1931 la teknika personaro fondis por si apartan organizaĵon, kiu nun havas ĉirkaŭ 250 anojn. Multaj el la teknika personaro tamen estas ankaŭ anoj de la ĝenerala organizaĵo.

Centra estraro de la ĝenerala org. estas en Tallinn. La org. havas 14 filiojn, kiuj estas en provincaj urboj. La nombro de la anoj estas 1100. Kotizo = 20 cendojn monate. El tio 10 cendoj restas ĉe filio kaj 10 c. ricevas la centra estraro.

La org. apartenas ankaŭ al la „Centra ligo de ŝtataj kaj komunumaj oficistoj“, depost la 1920. jaro. Ĉar en Estonio la jura kaj ekonomia stato de ŝtatoficistoj grandparte estas aranĝita per leĝoj, kiuj estas la samaj por ĉiuj ŝtatoficistoj, ekz.: leĝoj pri salajroj, pensio, servo ktp., tial ankaŭ la bataltaktiko de ŝtatoficistaj organizaĵoj, laŭ cirkonstancoj estas formiĝinta tia, ke ĝeneralajn demandojn, kiuj rilatas ĉiujn ŝtatoficistojn, oni solvas pere de la centra ligo de ŝtataj kaj komunumaj oficistoj, dum specialajn demandojn, kiuj rilatas kaj interesas nur oficistojn de iu certa ofico aŭ institucio, solvas org. de oficistoj de la koncerna institucio.

Se rigardi la agadon de la p. t. t.-ista faka organizaĵo kaj ĝiajn rezultojn, tiam necesas noti, ke en ĉiuj tiaj demandoj, kiuj estas solveblaj en limoj de P. T. T. aŭ pri kiuj estas kompetenta la Ĝenerala Direktoro de l' P. T. T., oni sukcesis atingi pli bonajn rezultojn, ol en tiuj demandoj,



Estraro de la faka org. de estonaj p. t. t.-istoj. I vico de maldekstre: K. Sannamees; J. Kallmann, sekretario; J. Koff, prezidanto; J. Feldmann, vicprezidanto; A. Anveldt. II vico: V. Vahter, vicsekretario; Kase, R. Jaanus, J. Mau, J. Martinson, kasisto. Mankas sur bildo s-ro R. Kukkk, II vicprezidanto.

kiuj estas solvataj per leĝdona vojo. La plimulto de la estona popolo estas terkulturistoj kaj ankaŭ en parlamento la reprezento de terkulturistoj estas grandinflua. Ĉar la terkulturista partio en la parlamento rilatas al ŝtatoficistoj kaj iliaj postuloj ne bonvoleme, tial estas tre malfacile, laŭ leĝa ordo iun demandon aranĝi utile por ŝtatoficistoj.

La faka org. havas kunlaboron kun la Ĝenerala Direkcio pri atestado kaj rangaltigo de la p. t. t.-istoj. Nome, ĉiujare oni atestas ĉiun serviston pri liaj ecoj kaj kapabloj. La atestadon partoprenas: 1) oficejestro, 2) estro de la specialfako, 3) reprezentanto de oficistoj. La atestdokumentoj estas sendataj al la Ĝenerala Direkcio, kie miksa komisiono (3 reprezentantoj de la Ĝenerala Direkcio kaj 3 reprez. de la faka organizaĵo) envicigas la atestitojn por rangaltigo, kaj la Ĝenerala Direktoro de l' P. T. T. laŭ bezono rangaltigas ilin, laŭ nomaro de la komisiono.

Ĉe la Ĝenerala Direkcio de l' P. T. T. estas t. n. „fonduso por plibonigo de la stato de p. t. t.-istoj“. Tiu ĉi fonduso kolektiĝas el vendado de diversaj artikoloj, kiel leterpapero, -kovertoj, blankadoj de poŝtmandatoj kaj pakajkartoj. La fonduson administras 6-persona komitato, konsistanta el 3 reprezentantoj de p. t. t.-istoj kaj 3 repr. de la Ĝenerala Direkcio de l' P. T. T. Tiu ĉi komitato agas sur bazo de regularo,

en N.-Jõesuu (Hungerburg) 5 kaj en Haapsalu unu ripozdomon, kiuj estas aĉetitaj per mono, ricevita de tiu-ĉi fonduso. La p. t. t.-ista organizaĵo luas somere en Elva ĉambrojn por ripozantoj. Ĉiuj anoj de la organizaĵo kaj iliaj familianoj povas sian libertempon pasigi tie sen pago. Uzi ĉi-favorajn oni povas kompreneble nur ricevante libertempon dum someraj monatoj. Neanoj pagas 3 kronojn monate por la ĉambro.

La p. t. t.-ista organizaĵo kaj same ankaŭ la centra ligo de ŝtataj kaj komunumaj oficistoj bazas sur nepolitika aŭ neŭtrala platformo. Kun laboristaj organizaĵoj la ŝtatoficistaj organizaĵoj ne estas unuiĝintaj, sed inter ili estas bona rilato kaj en kelkaj ĝeneralaj demandoj, rilatantaj salajrulojn, estas ankaŭ kunlaboro.

La p. t. t.-ista org. havas komunan organon (Side) kun la fervojista centra organizaĵo faka. En ĝi oni pritraktas ĉiajn, al ŝtataj kaj komunumaj oficistoj rilatajn ĝeneralajn demandojn, tamen pli speciale kaj detale la staton de p. t. t.-istoj kaj fervojistoj.

Ĉefaj taskoj de la faka org. estas, defendi juran kaj ekonomian statojn de la oficistoj, sed krom tio ankaŭ ne forgesante kulturajn necesojn. Pli grandaj filioj havas bibliotekojn, kiuj estas senpage uz-eblaj. Ĉe pli grandaj filioj estas ankaŭ sportaj sekcioj, gimnastikaj grupoj kaj rondo de laŭteniso.

konfirmita de la Trafikministro. La komitato starigas buĝetojn kaj disdonas subtenojn. Plejparte la fonduso estas uzata por havigo de ripozdomoj, eldonado de la faka gazeto kaj por kulturaj celoj (bibliotekoj, sporto); malpli granda parto estas donata por subteno al unuopaj personoj, okaze de deficitaj ĉe ĝi-ĉetoj kaj malfacilcoj. La p. t. t.-ista organizaĵo havas

IOM PRI STATO DE ESTONAJ P. T. T.-ISTOJ

J. KALLMANN * Tradukis J. VAHTKERL

Poŝto, telegrafo kaj telefono en Estonio estas monopolo de la ŝtato. La P. T. T. subas al ministerio de vojoj. Ĉiuj p. t. t.-istoj estas ŝtatoficistoj kaj havas la samajn rajtojn kaj deojn, kiel aliaj ŝtatoficistoj. Ĉiuj ŝtatoficistoj dividiĝas je du grupoj a) ĉiamaj, b) maldungeblaj. Por la ĉiamaj oficistoj la ofico estas por la tuta vivo certigita per la leĝo pri ŝtatservo. Ĉiaman oficiston oni povas maldungi nur per juĝa verdikto, aŭ (pro malkonvena konduto) per decido de la registaro. Sed, okaze de forigo de ofikloko aŭ malmultigo de oficistoj, estas tamen ebla maldungo de ĉiamaj oficistoj. La etatoj de oficistoj estas fiksataj per leĝoj, sed okaze de rearanĝado de ŝtataj institucioj, tamen estas per leĝo donita al registaro la rajto, ŝanĝi la etaton, malpliigi la nombron de la oficistoj, aŭ pligrandigi iun specon de ili. Do, per tio jam kvaran jaron estas tute ebla maldungo de oficistoj per nuligo de iu ofikloko.

La servkondiĉoj de maldungeblaj oficistoj estas egalaj kun tiuj de neŝtataj oficistoj. Maldungeblan oficiston la dunginta estro povas maldungi, antaŭsciigante 2 semajnojn, aŭ en iu tago tuj, antaŭpagante salajron de du semajnoj.

En la P. T. T. apartenas al kategorio de ĉiamaj oficistoj: p. t. t.-oficistaj, inĝenieraj, teknikistoj kaj mekanikistoj. Al kategorio de maldungeblaj oficistoj apartenas: leteristoj, muntistoj kaj majstroj.

La ŝtato de ĉiamaj oficistoj kaj maldungeblaj oficistoj diferencas unu de la alia nur per ebleco de maldungo. Ĉiuj aliaj aranĝoj kaj favoraĵoj, kiel: pensio, kuracado, libertempo, salajraj alpagoj k.t.p. estas la samaj por ambaŭ kategorioj.

Diferenco estas ankaŭ en antaŭpreparo por la ofico. Estontaj ĉiamaj oficistoj servas 6 monatojn kiel lernantoj, farante post 3 monatoj antaŭekzameno kaj post 6 monatoj ordinaran ekzamenon. Kiel lernantoj estas akceptataj nur tiuj, kiuj estas eksperimentitaj en t. n. oficejo por profesielekto, kaj kiuj havas bonan kaj certecan decidkapablon, bonan logikan kaj mekanikan memoron, rapidon en agado, bonan sanon kaj taŭgan strukturon.

En ekzameno oni postulas de la ĉiamaj oficistoj scipovon de p. t. t. servo, same ankaŭ konon de teknika parto de telegrafo kaj telefono. Antaŭpreparo de mekanikistoj estas egala kun tiu de la ĉiamaj oficistoj. De ili ankaŭ estas postulata kono de p. t. t.-servo. De leteristoj antaŭpreparo ne estas postulata. Sed komence, dum 2—3 monatoj ili estas kalkulataj, kiel provizoraj servistoj. Kiel muntistojn oni akceptas laboristojn de telegrafo kaj telefono, sed, por konfirmi ilin al ilia ofico, ili antaŭe devas fari ekzamenon pri teknika fako. Ekzamenpostuloj por muntistoj, mekanikistoj kaj oficistoj estas diversaj inter si. La tiurilataj programoj estas kunmetitaj de l' Ĝenerala Direkcio de P. T. T.

Se la lernanto estas lerninta ses monatojn kaj farinta necesajn ekzamenojn, tiam li estas nomata kandidato de ĉiamaj oficistoj aŭ mekanikistoj. Kiel kandidato li devas memstare labori, praktikante en diversaj oficoj 6 monatojn, unu jaron, iu foje eĉ 2—3 jarojn, se ne ekzistas vaka loko. Ricevante lokon, la kandidato estas nomata ĉiamaj oficisto, aŭ mekanikisto de plej malaltaj rangoj. Plua plialtiĝo dependas de antaŭenemo, fervoro kaj laborkapablo. Sed pli altajn rangojn oni ne ricevas sen specialaj ekzamenoj. La ekzamenoj estas du specaj: pri fremdaj lingvoj (germana, angla, franca) aŭ pri kono de t. n. administracia servo. En ekzameno pri administracia fako oni postulas konon de leĝoj

kaj regularoj, surkiuj bazas la agado de l' P. T. T., same ankaŭ de leĝoj kaj regularoj, kiuj validas por la personaro. Se la ekzamenoj estas faritaj, tiam oni ricevas altiĝon okaze de vakiĝo de pli altranga ofikloko.


Ĉiujaran libertempon la p. t. t.-istoj ricevas laŭ la sama aranĝo kiel aliaj ŝtatoficistoj. Post servo de unu jaro, la libertempo estas 15-taga kaj post 2 jaroj 30-taga po jare. La libertempo estas donata dum la tuta jaro. Nun en kelkaj fakoj (ekz. kancelario), kie estas eble prokrasti la laboron, oni ricevas libertempon somere. La libertempo estas regulata tiel, ke certa persono, unu jaron ricevas ĝin somere, alian jaron vintre. Estas kelkloke ankaŭ tiel, ke ĉiu persono ĉiujare ricevas duonon de sia libertempo somere, alian duonon vintre. Antaŭ du aŭ tri jaroj oni dungis provizorajn oficistojn, por ebligi al konstantaj oficistoj libertempon somere. Nun la registaro ne donas plu monon por dungado de provizoraj oficistoj kaj tial, se la ofico ne ebligas libertempon sen anstataŭanto, oni ĝin tute ne ricevas. En T. T. T. tamen ĉiuj oficistoj estas ricevintaj siajn libertempojn.

Labortempo en P. T. T. estas regulita sur bazo de 8-hora labortago. Sed, se ebligas racia aranĝo kaj divido de la laboro, tiam labortago povas esti ankaŭ 7-hora. Ĝis nun estas 7-hora labortago, t.e. 42-hora laborsemajno. Sed nunjare oni pligrandigos la normon de laboro kaj per tio ankaŭ la labortago iĝos 8-hora, dum en la Ĝenerala Direkcio la labortago restas 7-hora. La nokta laboro estas taksata 1 1/2-oble, se nokte oni havas 200% da potaga laboro, se malpli — 1-oble.

La faka org. de p. t. t.-istoj ne konsentas pri 8-hora labortago, dum en aliaj ŝtataj institucioj ĝi estas 7-hora. La ĝenerala direktoro de la P. T. T. motivas starigon de la 8-hora labortago per ekzemplo de aliaj landoj, ĉar, laŭ lia diro, en aliaj landoj de la tuta mondo, la labortagoj de p. t. t.-istoj estas 8-horaj.



S-ro J. Kallmann. Li venis al poŝta servo en nov. 1920, kiel leterportisto. En j. 1925 li fariĝis mekanikisto kaj 1931 poŝtoficisto. Estante ankoraŭ leterportisto, li lernis en vespera mezlernejo. Finante la mezlernejon en 1925, li ekstudis en universitato la juron, finante en j. 1931. En j. 1932 li forlasis poŝtan servon, estante nun advokato. De la j. 1927—1932 li estis prezidanto de la centra estraro de l' p. t. t.-ista faka organizaĵo kaj nun ĝia sekretario kaj jura konsilanto.



Ĉefa poŝt- telegraf- telefonejo en Tallinn

La domo estas konstruita antaŭ ĉirkaŭ 65 jaroj por banko. Nun troviĝas en ĝi poŝto, telegrafo kaj telefono. En unua etaĝo estas operaciaj salonoj de poŝto kaj telegrafo. En dua etaĝo — kancelario, kaj salonoj por malfermo de poŝto, distribuo kaj ekspedo. En tria etaĝo estas salonoj por telegrafaj aparatoj. Kvara etaĝo enhavas novan, modernan telefoncentron, aŭtomatan, kiu estas instalita antaŭ kelkaj jaroj. Ĝi estas konstruita en fama telefonfabriko Erikson, en Stockholm. Nunmomente la centro havas 5000 abonantojn.

En poŝta fako oficas en tiu ĉi domo 220, en telegrafa — 80 kaj telefona — 150 homoj. Pro aŭtomatigo de telefoncentro, oni malpliigis tie ĉirkaŭ 100 oficistojn.

La ĉefpoŝtejon gvidas s-ro Märt Ruubel jam dum 9 jaroj. Li estas ankaŭ prezidanto de p. t. t.-ista Esperanto, „Erpo“.

Estro de ĉeftelegrafo estas s-ro Aleksander Kesküla kaj estro de telefonreto s-ro Jaan Martens.



S-ro M. Ruubel, estro de Tallinna Ĉefpoŝtejo.

Estonaj leterpostatoj.

Estas dupecaj uniformoj, el kiuj oni povas elekti laŭ deziro. Alia speco, kiu ne estas prezentita sur la bildo, havas altan kolumon kaj unu vicon da butonoj, ĝi estas uzata de pli malmultaj. Ankaŭ oficistoj kaj mekanikistoj, kiuj havas rilatojn kun publiko ekster oficejo, havas uniformon, sed kun iom aliaj insignoj.

Dekstre sidanta, s-ro J. Vahtkerl, kunlaboranto de „La Interligilo“.




ESTIĜO DE ESTONAJ POŝTAJ STAMPILOJ KAJ POŝTMARKOJ

JOH. VAHTKERL

En februaro 1918 Germana armeo okupis Estonion, forpelante de tie ĉi rusajn militistojn, kiuj jam estis perdintaj disciplinon. La okupantaj potencoj fermis ĉiujn poŝtejojn en la tuta lando kaj konfiskis monon, p. markojn, aparatojn, librojn, eĉ korespondaĵojn, tiel tute finante agadon de la poŝto por loĝantoj. Poste ili malfermis kelkajn poŝtejojn por publiko, kies nombro, dum ilia foriro en novembro, estis nur 20 en la tuta lando. La afrankado de sendaĵoj okazis per „oberost“ — (supra oriento) p. markoj, eldonitaj por Estonio, Latvio kaj Litovio. En novembro, kiam okupantoj forlasis la landon, la lokaj agantoj kaj poŝtistoj tuj komencis organizi poŝton kaj ĝiajn servojn. La ĉefpoŝtejon en Tallinn s-ro H. Rikand akceptis de okupantoj la 13-an de nov. kaj tiun ĉi daton oni nun konsideras, kiel fandan daton de Estona poŝto. Kvankam en transprenitaj oficejoj tuj komencis la agado, tamen la oficiala malfermo de p. t. t. servoj estas deklarita 19.XI.1918 per dekreto de s-ro Rikand 18.XI, ĉar transpreno de la oficejoj tra la tuta lando kaj aranĝado daŭris kelkajn tagojn. Kompreneble, en komenco mankis ĉio, inter ili ankaŭ p. markoj. Tial dum unuaj tagoj, la uzantoj de poŝto devis la korespondadojn mem porti al poŝtejo, pagante sendkoston al la oficisto, (dekreto de s-ro Rikand) kiu do notis ĝin sur la sendaĵo, aldonante ankaŭ sian subskribon. En kelkaj lokoj la akceptanto iufoje surskribis

ankaŭ la daton, sed ordinare ili tion ne faris. Do ordinare mankis sur sendaĵo dato kaj nomo de sendloko. En tiuj lokoj, kie ankoraŭ ekzistis rusaj stampiloj, oni uzis ilin por montri la daton kaj lokon. Ekzemplon de tia letero (malgrandigita) montras la bildo a. Ĝi estas loka (enurba) registrita letero. La vortoj signifas: Kin-nitatud kiri — registrita letero; makset(ud) — pagita; ametr(ik) — oficisto. En la stampo rusa nomo de Tallinn — Revelj. Por plifaciligi la laboron ĉe akcepto, en kelkaj sed tre malmultaj lokoj oni baldaŭ faris stampilojn: Maksetud (Pagita). Mi havas sciigon pri tia afrankmaniero nur en unu loko, tiu estas Viljandi. La bildo b (kopiita) montras stampojn sur koverto de tiel afrankita letero, kiun havas iu kolektisto. Laŭ sciigo oni vendis en poŝtejo kovertojn kaj poŝtkartojn, jam antaŭe stampitajn. Rusaj stampiloj ne ekzistis plu en ĉiuj lokoj kaj ofte oni ankaŭ ne volis uzi ilin, kiuj en multaj lokoj havis aliajn, al loka loĝantaro fremdajn, nomojn. Tial, tre baldaŭ oni faris stampilojn kun estonaj nomoj de lokoj. Ne estis eble en organiza periodo, kiam krom aliaj mal-facilaĵoj, oni devis siajn fortojn streĉi kontraŭ ĵus ree komencinta milito, tuj provizi la landon per ordinaraj, metalaj, kalendaraj stampiloj. Tial oni faris stampilojn nur kon nomo de koko, kio estis facile efektivegebla. Ordinare ili estis el gumo, sed kelkaj ankaŭ el metalo kaj ligno. Laŭ sciigoj ili estis el ligno en Keina, Väike-Maarja kaj Tõrva (bildo c). La lasta estas interesa ankoraŭ tial, ke ĝi havis gatan skribon. Estis okazoj, kie oni por tio uzis ankaŭ iajn aliajn stampilojn, fortranĉante la





c



c



f

e

necesajn vortojn. Bildo ĉ montras tian stamrilon en Martna. Ankaŭ Valga, kiu ĝis 1.II 1919 estis okupita de rusaj bolŝevistoj, ricevis komence originalan stampilon. Nome, kiam bolŝevistoj estis devigitaj forlasi la urbon, veturis tien p. oficisto Maurer el Tartu, por malfermi la poŝtejon. Mankis ĉiaj necesaj objektoj, kiel pesiloj k. t. p., kiujn li serĉis kaj prunteprenis en diversaj lokoj. En librovendejo de „Postimees“ li trovis stampilon: „Postimehe raamatukauplus Valga osakond“ (Libro vendejo de Postimees, filio en Valga). Li fortranĉis vortojn -imehe kaj raamatukapulus, tiel ricevante poŝtan stampilon (bildo d).

Kiam oni ekuzis unuan longan nomostampilon, ne estas eble scii. Ĉirkaŭ 20.XI en Viljandi oni jam uzis tian stampilon. Bildo a montras, ke oni uzis tian stampilon pli frue en Tallinn (18.XI), sed laŭ onidiro, tio estis aranĝita de iu kolektisto. Ankaŭ tio, ke estas du stampoj, (Estonaj kaj Rusa) sur unu sendaĵo, ne estas ordinara, sed verŝajne farita laŭ peto de kolektisto.

Estas kompreneble, ke la longajn, nomostampilojn oni uzis ankaŭ por senvalorigo de p. markoj, kiam ili jam aperis. En iuj lokoj ili estis sufiĉe longe uzataj. Plej malfruan daton pri tio mi povas noti 25.IX.1919 en Karuse. En kelkaj lokoj oni sufiĉe longe entute ne havis stampilon kaj senvalorigis p. markojn, mane surskribante nomon de la loko. Ekzistas noto plej malfrua pri tia senvalorigo 9.IV.1919 en Nuia. Sed mi dubas pri neceso de tiom longa manskriba senvalorigo. Ankaŭ rusajn stampilojn en iuj lokoj oni longe uzis. Iu poŝtoficisto en Tallinn havas leteron, senditan el Paide kaj stampita per rusa stampilo 14.III.1919.

Kiam kaj kie oni ekuzis unue estonlingvan kalendarstampilon, tio ne estas sciata. Kiel plej frua estas al mi sciata letero en kolekto de Dr. Labbé, datita 30.I.1919 Tallinn. Do en komenco en la tuta lando oni uzis trispecajn stampilojn, krom tio ankoraŭ manskriba senvalorigo de p. markoj. En fino la 1919 jam en ĉiuj lokoj estis uzataj estonlingvaj kalendar-

stampiloj. Kiel unua stampilmaŝino en Estonio estas restinta de rusa tempo. Dum germana okupado oni ĝin kaŝis en Tallinna ĉefpoŝtejo kaj elportis ĝin nur post kelkaj monatoj en 1919, kiam la laboro jam ree multiĝis. La unuan afrankmaŝinon (por anstataŭigi p. markojn) aĉetis la banko Scheel & Co en Tallinn, en oktobro 1929.

Pri poŝtmarkoj. Antaŭe, ol povis esti eldonitaj estonaj p. markoj, en Rakvere oni proprainiciate surprisis (17.XI.1918) al rusaj afrankitaj kovertoj, p. kartoj kaj p. markoj vortojn „Eesti, (Rakvere)“ (bildo e) kaj sub ili novan valoron. Al 2 kop. oni surprisis 10, 15, 20, kaj sur 1 kop. p. m. 35. La p. direkcio en Tallinn ne agnoskis tiajn afrankilojn, sed tamen oni uzis ilin por sendi korespondaĵojn. Entute ili estis malmultaj, eble nur iom pli ol 700 ekzempleroj sume. El ili 1-kopeka kun surpriso 35, estis nur en 26 ekzempleroj kaj filatelitoj ĝin taksas alte. El ĉiuj ĉi surprisitaj p. markoj oni povis uzi por afranko de korespondaĵoj nur tre malmulte, ĉar krom ne agnosko de la p. direkcio ne ebligis tion filatelitoj, kiuj ilin tre baldaŭ foraĉetis. Poste, kiam jam ekzistis estonaj p. markoj, oni tamen ankaŭ en Tallinn surprisis (6.V.1919) rusajn p. markojn (bildo f). Tio estis farata per manstampilo guma, dum en Rakvere oni surprisis en presejo. Tiu-ĉi surpriso okazis laŭ ordono de la Ĝen. Direkcio de l' p.t.t., do kun agnosko por afranko. La nombro de tiuj ĉi p. markoj estis ĉirkaŭ 16.000. Estis 13 diversaj valoroj, de 1 kopeko, ĝis 10 rubloj. En plej multaj ekzempleroj estis 5 kopeka, 3.803 ekz., plej malmulte 1 kop., 7 ekz. Laŭ onidiro el tiuj surprisitaj p. markoj oni povis uzi por afranko nur ĉirkaŭ 1%, dum aliajn ĉiujn havigis al si la filatelitoj.

Pro urĝa bezono pri p. markoj, oni ne havis tempon, por aranĝi konkurson pri desegnaĵoj por eldonotaj p. markoj. Por rapide aranĝi la aferon, la direktoro s-ro H. Rikand 18.XI mendis p. markojn ĉe s-ro Rud. Zero, gvidanto de presejo de Mäns, por kiuj li mem aranĝu ian ilustr-

e
 Sino en
 o. Dum
 Tallinna
 st kelkaj
 jam ree
 on (por
 a banko
 ro 1929.
 ol povis
 Rakvere
 1918) al
 kaj p.
 (bildo e)
 kop. oni
 p. p. m.
 agnoskis
 uzis ilin
 ili estis
 ekzemp-
 surpreso
 kaj fila-
 surpres-
 afranko
 lte, ĉar
 kcio ne
 baldai
 estonaj
 Tallinn
 markojn
 nstamp-
 surpresis
 uzis laŭ
 p.t.t., do
 mbro de
 . Estis
 ĝis 10
 roj estis
 e 1 kop,
 esitaj p.
 ko nur
 ĝis al si
 oni ne
 rson pri
 oj. Por
 ro s-ro
 koin ĉe
 sejo de
 n ilustr-



1



1a



2



3



4



5



6



7



8



9



10



11



12



13



14



21



15



17



18



16



20



19



22



23


aĵon¹⁾. Ankoraŭ oni ne sciis, kia estos la nomo de estona monunuo, sed, ĉar ĝis nun oni uzis ĉi tie rusan, poste „Ober ost“-monunuon, rublon, dividatan je kopekoj, tial s-ro Rikand por tiuj ĉi unuaj p. markoj ordonis preni kopekon, kiel valoran nomon. Kaj jam post 2 tagoj aperis unuaj estonaj p. markoj, 5 kopekaj, rozkoloraj (bildo 1), kiujn oni ekvendis 22.XI. Oni presis ilin 1.941.427 ekzemplerojn, kaj poste 3.592.866 ekz. 15 kopekajn, kiuj ekcirkulis 30-an de nov. 1918. Aldone oni poste presis ankoraŭ 35 k. brunajn kaj 70 k. olivoverdajn, ŝanĝante ĉe ili la lokon de numero kaj forlasante literon k. (Bildo 1-a).

Ĝis nun estas en Estonio aperintaj divers-specaj p. markoj, pri kiuj bildoj ĉi sube. Parto el ili aperis perforite kaj neperforite, sed mi notas nur tiujn, kiuj aperis unue. Ekzistas ankaŭ eldonoj, poste surprisitaj, tiujn mi ne notas. Unua nr. post indiko de desegnaĵo montras valoron, litero — nomon de mono, latina nr. — monaton de ekcirkulo kaj post ĝi — la jaro.

1) Floraj (unuaj Est. p. m.) 5 kaj 15 k. XI 1918; 35 kaj 70, I. 1919. 2) Mevo 5 penni V; 35 p. VII 1919; 70 p. III 1920. 3) Cifero en ovalo 5 kaj 10 p. V. 1919. 4) Ŝipo de vikingoj 1 m. VII; 5 m. IX 1919; 15 m. kaj 25 m. IX 1920. 5) Suno(?) 15 p. IX. 1919. 6) Flug p. m. 5 m. III 1920. 7) Vidaĵo de Tallinn 35 p. III; 25 p. V; 2 m. VIII, 2,50 m. X; 1 m. XII 1920; 50 m.

¹⁾ Pihlone pri tio en „La Interligilo“ nr. 106, 1931.

IX 1921; 25 p. IX 1929. 8) Invalidaj 35+10 kaj 70+15 p. VI 1920. 9) Ruĝa kruco 2½ (3½) kaj 5 (7) m. VIII 1921. 10) Forĝisto 5 (tempo?), 10 m. II 1922; 9 m. VI 1923; 20 m. IV, 12 kaj 15 m. V 1925. 11) Tekstistino 2, 2½ kaj 5 m. IV 1922; 1 m. I, ½ m. III 1923; 3 m. III 1924. 12) Landkarto 100 m. III 1923; 300 m. X 1924. 13) Teatro „Estonia“ (en Tallinn) 30 kaj 70 m. XII 1924. 14) Flug p. m. 5, 10, 15, 20 kaj 45 m. II 1924. 15) Teatro „Vanemuine“ (en Tartu) 40 m. X 1927. 16) Serio el 5 diversaj p. markoj de memoriga komitato de liberiga milito: 5+5 m. episkopa kastelo en Kuressaar; 10+10 m. ruinoj de katedralo en Tartu; 12+12 m. turo de „Longa Hermann“ en Tallinn; 20+20 m. fortikaĵo en Narva; 40+40 m. ĝenerala vidaĵo de Tallinn XI 1927. 17) Tri leopardoj (en ŝtata blazono) 5, 10, 12, 20 cend. IX 1928; 1, 2 kaj 15 c. XI 1928; 4, 8, 20, 25, 40, 60 kaj 80 c. II 1929. 18) Ruĝa kruco 2+3, 5+3, 10+3 kaj 20+3 c. VIII 1931. 19) Ĉefkonstruaĵo de Tartua universitato 10 kaj 20 c. kaj 20) Observatoria turo de Tartua univ. 5 kaj 12 c. VI 1932. Tiuj ĉi kvar p.m. estas eldonitaj por memoro de 300 jara datreveno de la Tartua univ. 12 kaj 20 end. havas Latinlingvan tekston. 21) Akvofalo en Narva 1 kr. IV 1933. 22) Kantodio, Vanemuine, (por memoro de la 10 tutlanda kantfesto) 2, 5, kaj 10 c. VI 1933. 23) Serio de 4 p. markoj por kontraŭ tuberkuloza societo. Al prezo de ĉiu p. m. estas aldonata 3 c. por tiu ĉi societo. La markoj estas:



S-ro Rud. Zero, kiu faris ilustraĵojn de unuaj Eston. poŝtmarkoj. (Malddekstre).



S-ro Karl Triumph. Inter la desegnintoj de la ilustraĵoj por Eston. poŝtmarkoj, nur li sola estas poŝt-oficisto. De li estas desegnitaj ankaŭ poŝtmarkoj de flugpoŝto

PRESERAROJ

					Estas	Legu
Paĝo	99	kolumno	I lin.	2	supre ka	— ke
"	105	"	I	" 25	" } p. t. t. oficistaj	— -oj
"	105	"	II	" 19 malsupre	" } inĝenieraj	— -oj
"	106	"	"	" 14	" T. T. T.	— P. T. T.
"	107	"	II	" 4	" leterpostatoj	— leterportistoj
"	107	"	II	" 10	" gotika	— gotika
"	108	"	I	" 2	" kon, koko	— kun, loko
"	112	"	I	" 2 malsupre	" stamrilo	— stampilo
"	112	"	I	" 3	" Karsseli	— Karusselli
"	112	"	II	" 21 snpre	" Roosenvald	— Roosvald
"	113	"	I	" 5 malsupre	" p. t. t.-istaro	— p. t. t.-istaro
"	113	"	I	" 10	" postaĵoj	— postaĵoj
"	113	"	I	" 13	" posta	— poŝta
"	113	"	I	" 13	" telefondj	— telefonejoj
"	113	"	II	" 18	" siusemajna	— ĉiusemajna

Krom tio p. 107 bildo d malklara teksto estas: **Post Valga osakond**

Ayuntamiento de Madrid

faka a
kurson
person
povas r
Esp-ist

Tame
Esp.-is
intaj l
aliloke
demanc
grupo
nombr
granda
sufice
grupo.
propag
Propag
O. Nou
dukoj
koloj p
„Side“
igo de
ligilo“
en Est
kerl a
salutoj
landoj,
resoj

Tiel
atingis
de la
de Ilep
la aso
Tion d
de tie

ESPERANTO ĈE P. T. T.-ISTOJ EN ESTONIO

P. t. t.-istoj estas en servo de internaciaj rilatoj kaj tial estus nature, se inter ili estas multaj, kiuj scipovas internacian lingvon. Tamen, domaĝe, la afero estas alia, ne nur ĉe ni, sed ankaŭ en aliaj landoj. Esp. movado ĉe p. t. t.-istoj en Estonio estas precipe en Tallinn, ĉar tie estas ja ankaŭ plej multe da p. t. t.-istoj. Tie estis kelkaj Esp. p. t. t.-istoj jam antaŭ multaj jaroj. Jam de la jaro 1923 s-ino Hilda Dresen (fama pro tradukoj de poezioj) de tempo al tempo kunlaboris al nia faka gazeto „La Interligilo“, estante ankaŭ delegito de llepto. Ŝi tradukis artikolojn el „La Interligilo“ por la Estona faka gazeto „Side“ kaj estis Esp. korespondanto de la tutlanda faka asocio. Per ŝia iniciato aperis ankaŭ Estona nr. de „La Interligilo“ en j. 1925, kiu estis presita en Estonio je kosto de la faka asocio. En j. 1924 s-ro J. Törn aranĝis Esp. kurson por p. t. t.-istoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj. Sed el la lernintoj ion povas nun ankoraŭ nomi aktiva Esp-isto nur unu personon.

Tamen daŭris ekzisti kelkaj Esp-istoj inter p.t.t.-istoj, lernintaj la lingvon unu tie, alia aliloke. Iufoje ili eĉ starigis demandon pri fondo de Esp. grupo por p. t. t.-istoj. Sed la nombro de samecelanoj estis malgranda kaj eble ili ankaŭ ne sufiĉe sentis la bezonon de tia grupo. Tamen ili penis iel propagandi Esp. ĉe samfakanoj. Propagandadon daŭridis s-roj O. Nõu kaj J. Vahtkerl per tradukoj kaj verkado de prop. artikoloj por nacilingva faka gazeto „Side“, same ankaŭ per publikigo de artikoloj en „La Interligilo“, pri vivo de p. t. t.-istoj en Estonio. Krom tio s-ro Vahtkerl aranĝis per Esperantajn salutojn inter Estonio kaj aliaj landoj, okaze de p.t.t.-istaj kongresoj kaj gravaj datrevenoj.

Tiel propagandante ili fine atingis tion, ke estraro de la de la tutlanda faka asocio konsideris la signifon de llepto kaj laŭ rekomendo de J. Vahtkerl aligis la asocion al llepto, kiel kolektivan membron. Tion decidis tutlanda kongreso en 1928 laŭ propono de tiama prezidanto de faka asocio, s-ro J. Kallmann. Ĝi estis membro de llepto ĝis 1930, sed poste, ial la estraro forgesis siajn devojn rilate la kotizon¹⁾. En la vintro 1929/30 laŭ propono de la estro de Tallinna ĉefpoŝtejo, s-ro M. Ruubel, s-ino M. Pagar aranĝis Cseh-metodan kurson por p. t. t.-istoj, kiun partoprenis deko da personoj. Tiu ĉi kurso pligrandigis nian nombron eble je 3 personoj.

Malsanulo kun flegestino 5 c.; blanka floro 12 c.; sanatorio por turbekuloz-malsanuloj 10 kaj 20 c. X 1933.

La p. markojn desegnis: Rudolf Zero, (faris ilustraĵojn) nr. 1. Ed. Poland, nr. 2, 5, 7, 9. Peet Aren nr. 3, 4. Karl Triumph, nr. 6, 12, 13, 14, 15, 18, 21, 22. Th. Björnström (finlandano) nr. 10, 11. Joh. Naha, nr. 16. Günther Reindorff, nr. 17. Ilmar Breiberg, nr. 19, 20, 23.

Kiel supre notita, jam antaŭ jaroj estiĝis ĉe Tallinnaj Esp-aj p.t.t.-istoj ideo pri fondode Esp. faka grupo, do nun ĝi povis efektiviĝi en komenco de nuna jaro. La kunveno de organizantoj okazis la 29-an de jan., kiun partoprenis s-ino Hilda Dresen, s-roj J. Törn kaj J. Vahtkerl. La kunvenintoj decidis, ke la grupo estu fondata ĉe Tallinna filio de tutlanda p.t.t.-ista asocio kaj al ĝi povu aliĝi ankaŭ neesperantistoj samfakanoj, kiuj aprobas Esperanton. Projekton de la regularo prezentis s-ro J. Vahtkerl. Kiel celo de la grupo aŭ rondo estis starigita en la regularo: a) Propagandi kaj disvastigi Esp-on inter p. t. t.-istoj; b) per tiu ĉi lingvo starigi kaj plifaciligi interrilatojn kun alilandaj samfakanoj kaj iliaj organizaĵoj; c) labori por enkonduko de praktika uzado de Esp. por internaciaj rilatoj en p. t. t.-fakoj.

La 26.11 okazis malferma kunveno de la rondo,



Estraro de Esp. Rondo p.t.t.-ista en Tallinn. Sidantaj (de maldekstre): frl-ino G. Kippar, vicsekretario; s-ro M. Ruubel, prezidanto; s-ino S. Märska, kasistino. Starantaj: frl-ino H. Dresen, unu el la fondintoj; s-ro J. Törn, viceprezidanto; s-ro Vahtkerl, sekretario.

kiun partoprenis 12 personoj, el ili 2 neesperantistoj. Prezidis s-ro J. Törn, protokolis s-ro J. Bleyer. Enkonduke parolis s-ro J. Vahtkerl pri neceso kaj taskoj de la rondo. S-ro M. Ruubel parolis pri signifo de Esperanto. Oni pridiskutis la regularon, agadplanon, buĝeton, fiksis kotizon (50 cend. jare) kaj elektis la estraron.

La Estraro de E. p. t. t. rondo, dum sia unua kunveno decidis aranĝi Esp. kurson por samfakanoj. Necesas noti, ke Tallinna filio de p. t. t.-ista asocio donis subtene 40 kronojn, kion la rondo petis por aranĝi la kursojn. La kurso komenciĝis la 10-an de marto, instruis s-ro J. Törn laŭ Cseh metodo. Partoprenis 14 personoj, inter ili ankaŭ estro de laborejo de la P. T. T., s-ro O. Jankovits. Nun la rondo havas 18 anojn, el kiuj 5 neesperantistoj. Sed ekzistas krom ili en Tallinn ankaŭ samfakanoj

1) Necesas aldoni, ke post verkado de tiu ĉi artikolo, la estraro de p. t. t. asocio decidis realigi al llepto kaj krom tio per kunlaboro kaj ioma mona subteno helpi por eldonado de tiu ĉi numero. La subtenon petis P. T. T.-ista Esp. rondo „Erpo“, kiu entreprenis kaj aranĝas tiun ĉi numeron.

LATVIO

15-JARA DATREVENO DE P. T. T. EN LATVIO

DS.

Antaŭ paroli pri tiu-ĉi faka temo, mi devas iom tuŝi ĝeneralan historion de latva popolo kaj lando. Kuŝanta apud Balta maro, la teritorio de nuna Latvio, loĝata de nia sendependa praularo, dum jarcentoj estis batalobjekto de pli potencaj najbaroj. Antaŭ 700 jaroj la landon invadis germanaj krucmilitistoj, per ruzo kaj kruco, glavo kaj sango ili konkeris kaj sklavigis la „sovaĝajn“ indiĝenojn. Pri postaj bataloj atestas blankiĝantaj ostoj de najbaraj popoloj — svedoj, poloj, litovoj, rusoj kaj, evidenta, de latvoj mem. — sur niaj kampoj kaj montetoj. Depost 18-a jarcento regiono apud Balta maro fariĝas posedaĵo

Esp-istaj, kiuj pro iaj kaŭzoj ĝis nun ne aliĝis al la Rondo.

Ĉefaj laboroj, kiun la Rondo plenumis en sia unua jaro, estas: aranĝado de Esp. kurso kaj aranĝado kaj tradukado de Est. parto de tiu-ĉi numero. Ĝenerala okupo konsistas nur en post dusemajnaj kunvenoj de la anoj, por ekzercado de la lingvo.

Pri Esp. movado ĉe p. t. t.-istoj en provinco ne estas multe notinda. Ĉi tie mi povas nur noti lokojn, kie estas Esp. samfakanoj. Tiuj estas: Tartu, Narva, Pärnu, Viljandi, Valga, Nõmme kaj Leisi.

En rilatoj de la Ĝenerala p. t. t. Direkcio al Esperanto, ankaŭ ne okazis io grava. Ĝis nun ĝi rilatis al Esp. ne aprobe, sed nur tolereme. Notinda estas nur, ke la 6.V.1926 la Ĝenerala Direkcio eldonis cirkuleron, permesantan uzi ankaŭ Esp. kiel ordinaran lingvon por telegramoj, interŝanĝataj enlande kaj kun Sovetio. Krom tio ĝi pasintjare permesis vendadon de poŝtkartoj kun Esp. teksto, (eldonitaj de Esp. Turista komisiono) en ĉiuj poŝtejoj de la tuta lando. Okaze de la 10. tutlanda kantfesto nunjare estis eldonitaj jubileaj poŝtmarkoj. La Kantista Ligo, kiu uzis Esp. por reklamo de tiu ĉi grava okazo, proponis, ke parto el tiuj ĉi p. m. havu Esp. tekston. Sed, domaĝe, la Ĝen. Direkcio ne konsentis pri tio.

Ĝenerale mi povas noti, ke, kvankam la intereso ĉe p. t. t. personaro pri internacia lingvo ne estas granda kaj la Ĝen. Direkcio pro diversaj kaŭzoj ne emas subteni Esp-on, tamen ili serioze rilatas al ĝi kaj konsideras ĝin, kiel rimarkindan fakton por internaciaj rilatoj. Ŝajnas, ke por pli gravaj paŝoj ili atendas ekzemplon de grandaj landoj, kvankam, ĝuste malgrandaj landoj, kies lingvo ne etendiĝas ekster teritorio de sia malgranda nacio, devus iri en unua vico, por agnosko kaj uzado de la internacia lingvo.

Delegitoj de Ilepto por Estonio. Tallinn, J. Vahtkerl, Koidu 26—2. Tartu, s-ro O. Nõu, Postkontor. Narva, s-ro Paul Roosenvald, Postkontor. Pärnu, s-ro Ed. Pent, Karsselli 22. Valk, s-ro Paul Sonberg, Postkontor.

de Ruslando, sed efektiva potenco restas en manoj de krucmilitistaj posteuloj, dum jarcentoj transformiĝintaj el sangavida kanajlaro en arogantan nobelaron. Sub ilia fera pugno kaj perforto latva popolo suferis, suferis silente, sed ardante pri la venĝo al siaj subpremantoj. Sian malfeliĉan sorton la popolo metis en siajn kantojn, malĝojaj kiel ĝia vivo mem.

En 1905-a jaro, periodo de rusa revolucio, ekbrilis lumeto de libereco, sed ĝi baldaŭ estis sufokita kaj rezultis nur pliajn kelkcentojn da kadavroj kaj kelkmilojn da ekzilitoj kaj malliberigitoj. En 1914-a jaro eksplodis la granda mondbuĉejo, espero de popolo pri liberiĝo de fremda jugo denove vekiĝis kaj ĉi-foje ne trompis — dank'al mondmilito kaj rusa revolucio la 18-an de novembro 1918-a Latvio estis proklamita sendependa ŝtato.

Dum la mondmilito ptt-istoro de l'latva teritorio estis dissemita tra vasta Ruslando. Surloke restis nur maljunuloj kaj iel forte ligitaj al siaj loĝlokoj. Ceteraj daŭrigis la servon en rusaj lokaj kaj militaj oficejoj, revenante post proklamo de l'latva ŝtato.

Sendependeco de Latvio, kiel demokratia respubliko, estis proklamita en Riga 18-an de novembro 1918-a. De ĉi-tiu dato oni rajtas kalkuli ankaŭ la ekfunkcion de l'latva p t, ĉar ptt-servoj por ĉiu ŝtato ja estas unuavice necesaj. Tamen komenciĝintaj bataloj kontraŭ malamikoj de l'ŝtato ekzisto malhelpis regulan funkcion de ptt-servo. Dum batalperiodo estis forrabita ankaŭ teĥnika instalaĵo de oficejoj kaj inventario.

Ĝis 26-a de decembro 1918-a iom regule instalitaj kaj funkciantaj estis nur 12 oficejoj, sed la daŭriganta milito en ilia laboro kaŭzis interrompojn, dum kiuj poŝt-servojn plenumis koncernaj armeaj oficejoj, telegrafa kaj telefona servoj ekzistis nur por militaj celoj.

Supera administracio de l'latva ptt rekomencis sian regulan rekonstruan laboron nur en julio 1919-a, kiam plejparto de l'lando estis liberigita kaj komuniko inter ĉiuj landpartoj fariĝis ebla. Ĝis 1-a de aŭgusto 1919-a refunkciis 76 poŝtaj kaj

VIO

29 poŝto-telegrafaj oficejoj kun etato de 618 personoj. Dum aŭgusto telegrafa servo estis instalita en ankoraŭ 21 oficejo. La rekonstruon de telegrafa servo tre malhelpis detruo de ekzistantaj linioj kaj manko de aparatoj. La lastajn ĉiu invadinta armeo konsideris kiel militakiraĵon kaj forkondukis al sia lando. Restis nur aparatoj, kiujn la surloke restinta personaro kun vivdanĝero kaŝis.

Telefono dum rusa regado ne estis ŝtata monopolo, ĝi estis posedaĵo de l'bienularo — germanaj terposedantoj kaj tuta interligo estis adaptita sole al iliaj bezonoj. Tial telefona fako bezonis ĝisfundan rekonstruon kaj dum unuaj 3—4 jaroj senĝene estis ebla interparolo nur ĝis 40-kilometra distanco. Dum tiu periodo daŭris intensa konstruo de novaj kaj riparo de jam ekzistantaj telefonaj linioj. Nur en 1924-a jaro komenĉiĝis vasta konstruo de kupraj kondukiloj, kiu ebligis pli vastan uzadon de telefona servo. Nun la nombro de telefonaj oficejoj jam superas 950 kaj tiu de abonantoj 55.000, la longeco de telefonaj kondukiloj 350.000 kilometroj.

La telegrafa komuniko pro disvolvo de telefona servo perdas sian signifon kaj limiĝas ĉefe je eksterlanda kaj transita trafiko, salutaj kaj, parte, ankaŭ komercaj telegramoj. Telefona interparolo ja estas ebla tra tuta lando, tial la longeco de telegrafaj kondukiloj atingis nur 39.000 klm. kaj la nombro de jare interŝanĝitaj telegramoj — 150.000 enlande kaj 190.000 eksterlanden.

La nombro de ptt-oficejoj dum 15 jaroj kreskis de 12 en fino de 1918-a jaro ĝis 1420 kun etato ĉ. 4200 personoj. Plejparto da oficejoj estas unuigitaj poŝto-telegrafo-telefonaj — memstaraj kaj t. n. n. help-oficejoj, priservataj de privataj personoj laŭ specialaj kondiĉoj.

Por posta transporto dum unuaj jaroj estis uzataj 16 poŝtvagonoj, nun — 35 vagonoj kaj 4 aŭtobusaj linioj. Plejparto da kamparaj oficejoj uzas transporton de privataj veturigistoj laŭ ĉiujare renovigata interkonsento. Disportadon de poŝtajoj hejmen plenumas ĉiuj oficejoj en 3-kilometra ĉirkaŭaĵo.

Tute novaj fakoj — poŝtĉeka servo kaj ŝparkaso estas starigitaj: la unua en

1924-a, la dua — en 1927-a jaroj. Ambaŭ fakoj disvolviĝas tre kontentige kaj estas konsiderataj kiel plej solidaj institucioj por ŝparaj, ĝiro kaj ceteraj monoperacioj. La tuta jara spezo de poŝtĉeka servo varias ĉ. 600 milionoj da latoj, deponoj je kontoj de ŝparkaso — inter 17—18 milionoj da latoj. Estas menciindaj kromtaskoj, plenumataj de tiuj du servoj — la poŝtĉeka, laŭ komisiono de pensia fako ĉe ministerio por popola bonfarto, elpagas per ĉiuj poŝto-oficejoj pensiojn al pensiigitaj ŝtato-ficistoj kaj militinvalidoj. La ŝparkaso por 3 milionoj da latoj aĉetis la obligaciojn de ŝtata prunto por vojkonstruado, kiujn ludonas al siaj klientoj je malgranda pago, po 1 lato por ĉiu lotumado, havante per tiu operacio konsiderindan profiton.

Granda laboro dum relative mallonga tempo estas farita en radiodisaŭdiga fako. Depost unuaj paŝoj de tiu mondon venkinta teknika miraklo, radiodisaŭdigo estas monopolo de ptt-administracio. La unua radiodisaŭdigo stacio en Riga ekfunkciis la 1-an de novembro 1925-a, havante 331 abonantojn. Pasintjare en Madona estas finkonstruita 20-kilovata stacio, kiu relajzas programon de Riga. Krome funkcias 0,1 kilovata relajsa stacio en Liepaja kaj estas komencitaj antaŭlaboroj por konstruo de nova sendstacio en Kuldiga. La nombro de radioabonantoj atingis 48.600. Ĉiuj abonantoj pagas jare 21 latojn, sendepende de forteco de siaj riceviloj. Por la sama pago ili ricevas ankaŭ siusemajnan 20—24-paĝan radioprograman ĵurnalon.

Por fari finan konkludon pri laboro de l'latva ptt dum unuaj 15 jaroj, mi devas menci kelkajn ciferojn de kompara statistiko laŭ lasta oficiala eldono:

1 poŝta oficejo priservas 46 km² klm. kun 1300 loĝantoj, 1 telegrafa oficejo — 69,6 km² kuu 2000 loĝantoj, 1 telefona oficejo 51,3 km² kun 1500 loĝantoj.

Ĉiuj 100 loĝantoj uzas ptt-servojn: forsendante kaj ricevante jare po 2300 leterojn kaj poŝtkartojn, 1380 eksemplarojn de gazetoj kaj ĵurnaloj; 41,7 poŝtmandatojn je sumo de 1981 latoj (1 lato = 1 svisa franko), 17,5 telegramoj, estas 2,8 telefonabonantoj, havante po 535,3 interurbajn interparoladojn.

ORGANIZAĴOJ DE L' MATERIALA STATO DE LATVAJ P. T. T.-ISTOJ P.T.T.-ISTOJ EN LATVIO

DS.

La plej forta organizaĵo de l' latvaj p. t. t.-istoj estas Societo de latvaj p. t. t.-istoj (Latvias pasta, telegrafa un telefona darbinieku biedriba). Fondita nur antaŭ 5 jaroj, ĝi unuigas 2850 gekolegojn, pli ol 60% de tuta personaro. Centra estraro de la societo, elektata de ĉiujaraj kongresoj, troviĝas en Riga. En provincaj centroj ekzistas 31 filioj, gvidataj de l' filia estraro, elektata same de jarkunvenoj.

Societo eldonas monatan revuon „P. t. dzive“ (P. t. vivo), kies abono por ĉiuj membroj estas deviga kaj kostas po 30 cent. monate.

En kadro de societo ekzistas 14 sekcioj — turisma, literatura, laŭ profesioj kaj laborlokoj. Krome ĉe la societo ekzistas 4 konstantaj komisionoj — por kolekto de monrimedoj, sanatoria, kultura kaj antaŭ kelkaj monatoj fondita, sed jam havanta pli ol 1000 aliĝintojn — komisiono de enteriga fonduso. Pagante po 15 cent. por mortokazo de membro mem kaj po 20 cent. de familiano, estas elpagataj po 500 latoj en mortokazo de membro kaj 200 latoj — de familiano, monsumoj tute sufiĉaj por deĉe aranĝi la lastan vojon de mortinto.

Komisiono por kolekto de monrimedoj zorgas pri pliriĉigo de societa kaso kaj kunlaboras kun sanatoria komisiono por akiri propran sanatorion-ripozdomon. Por tiu celo ĝi jam aranĝis 2 loteriojn, la 2-an de aprilo 1934-a okazos 3-a loterio, ĉar la bezonata sumo estas malfacile kolektebla. Dume la societo interkonsentis kun fervojista organizaĵo pri ludono de ĉambroj al societanoj en fervojista sanatorio de ŝlimbanejo Kemerj je tre farvoraj prezoj.

Kultura komisiono prizorgas aranĝon de prelegoj teatraĵoj k. s.

Ĉi-somere memstarigis, tamen restante en kadro de societo, sporta sekcio, nun nomata „P. t. sporto“. Ĝi disvolvas tre vigan agadon, kunlaborante kun sportaj sekcioj de aliaj ŝtatoficistaj organizaĵoj.

La revuo de societo „P. t. dzive“ per sia amplekso (40-paĝa), bela aspekto, serioza kaj diversflanka enhavo okupas la unuan lokon en latva profesia gazetaro. La redakcio de revuo (konsistanta el kolegoj K. Putenis, I. Druvinš kaj J. Brūmelis) favoras Esperanton kaj la revuo ofte enhavas pri-kaj peresperantan materialon. Depost septembra numero ĝi enhavas ankaŭ Esperanto-kurson.

En gvidpostenoj de la societo troviĝas kolegoj: J. Brūmelis — prezidanto, V. Griško — sekretario, K. Ritenieks — kasisto. La oficejo de centra estraro troviĝas en luita ejo — Riga, Parka iela 8 dz. 1. La oficejon priservas dungitaj sekretario kaj unu oficisto.

Mallonge skizinte la vivon de plej forta, kvankam pli juna, organizaĵo, mi ne rajtas preterlasi ankaŭ la alian, pli aĝan — faksocieton de l' latvaj p. t. t.-istoj, fonditan antaŭ 13 jaroj. Ankaŭ ĝi eldonas propran revuon „Vestnesis“ (Heroldo), same favoranta Esperanton. Ĝi same batalas por pli bona stato de l' latvaj p. t. t.-istoj.

Ĉu en tiom malgranda lando oni bezonas 2 organizaĵojn? Certe ne, ĉar multe da fortoj, almenaŭ antaŭ kelkaj jaroj, estas vane perditaj en interna luktado. Nun la rilatoj inter ambaŭ organizaĵoj jam fariĝis pli kolegaj kaj oni esperas je unuiĝo.

DS.

La materiala stato de latvaj ŝtatoficistoj entute kaj p. t. t.-istoj precipe neniam estis brila. Dum aliaj ŝtatoficistoj ĝuas 6-horan labortagon, por p. t. t.-istoj ekzistas 8-hora labortago, krom malmultaj esceptoj por noktaj deĵoroj. En tabelo de salajraj rangoj p. t. t.-istoj ĝenerale okupas la lastajn lokojn. En 20-a kategorio (monata salajro 84 lat.) troviĝas telegramportistoj, pordistoj k. s., en 19.—16. kategorioj (lat. 88—111 monate) — leterportistoj, en 15.—14. kategorioj (lat. 121 kaj 131 monate) — telefonistinoj kaj oficistoj dum unuaj servjaroj, 13.—11. katekvrioj (lat. 144—181 monate) — mezaj oficistoj kaj estroj de malgrandaj kamparaj oficejoj, en 10.—8. kategorioj (lat. 206—274 monate) superaj oficistoj en ĉeforabaj oficejoj kaj estroj de oficejoj en pli grandaj provincaj urboj. Pli altaj kategorioj estas nur esceptoj por supera p. t. t.-administracio (1 lato = 1 svisa franko).

La lastan salajropialtigon latvaj ŝtatoficistoj ĝuis depost 1.X.1929-a, la plialtigo variis inter lat. 4—10, do 3—5%.

En 1931-a jaro komenaigis paŝ-post paŝa malboniĝo en materiala stato de ŝtatoficistoj, kiu pro akriĝanta ekonomia krizo daŭras ĝis nun.

Jen mallonga kronologio de niaj perdoj:

1) Post ĉiuj 3 servjaroj en la sama ofica kategorio estis pagata t. n. daŭrserva aldono, varianta inter 4—9% de fundamenta salajro. Depost 1-a aprilo 1931-a servdaŭro por ricevo de tiu-ĉi aldonpago

Kiajn privilegiojn ni ĝuas en nia servo.

Por eksterlandaj legantoj certe ne estos sen-interese ekscii kiajn privilegiojn ĝuas iliaj latvaj kolegoj en p. t. t.-fako, despli, ke tiuj privilegioj estas akiritaj post longdaŭraj klopodoj de niaj organizaĵoj.

Unue, ĉiuj p. t. t.-istoj rajtas posedi kaj uzi radio-aŭskultan aparaton sen abonpago. Same senpage ni rinevas ĉiusemsjnan radio-programan ĵurnalon. Per tio ni profitas 21 laton jare.

Ĉe instalo de telefona aparato ni pagas por instalo duonon — anstataŭ 30 latoj nur 15 (1 lato = 1 sv. fr.). Abonpagon por telefono en ĉiuj lokoj, ankaŭ en ĉefurbo, ni pagas laŭ plej malalta, vilaĝa, tarifo, tiel profitante je telefona abonpago 35—55%.

Senpagan fervojon dum libertempo, malgraŭ ĉiuj klopodoj, la registaro rifuzis.

toficistoj
iam estis
6-horan
s 8-hora
ptoj por
salajraj
a lastajn
a salajro
oj, pord-
lat. 88—
15.—14.
nate) —
uaj serv-
44 — 181
estroj de
a 10.—8.
superaj
estroj de
aj urboj.
eptoj por
= 1 svisa

vaj ŝtat-
la plialt-
50%.
post paŝa
ŝtatofic-
ia krizo
j perdoj:
la sama
aŭrserva
e funda-
o 1931-a
aldonpago

s en

estos sen-
iliaj latvaj
privilegioj
j de niaj

uzi radio-
e senpage
a ĵurnalon.

as por ins-
(1 lato =
ĉiuj lokoj,
j malalta,
abonpago

algraŭ ĉiuj

estas plilongita ĝis 4, post unu jaro, de 1.IV.1932-a, ĝis 5 jaroj kaj depost 1.IV.1933 la elpago de pluaj aldonoj por servdaŭro por nedefinita tempo tute prokrastita.

2) Por pensia fonduso ŝtatoficistoj nenion pagis, sed depost 1-a de septembro 1931-a estas enkondukitaj 2%oj-aj enpagoj por pensia fonduso, dum aprilo kaj majo 1933-a ĉi-tiuj enpagoj estis jam 3%oj kaj depost 1-a de junio 1933-a — 4,5%oj.

3) Depost 16-a de septembro de la sama malfeliĉa 1931-a jaro estis ŝanĝita regularo pri kuracado de ŝtatoficistoj, per kiu estis enkondukitaj pagoj por vizitoj al ŝtataj kuracistoj, plialtigita kosto de kuraciloj k. s..

4) La plej gravajn malbonigojn alportis 1932-a jaro: depost 1-a de januaro estis enkondukitaj kriztempaj deprenoj (3—20%oj) kaj enpagoj por luktado kontraŭ senlaroreco po 1%oj. La lastaj por monata salajro super 200 latoj depost 6-a de januaro 1933-a estas plialtigitaj ĝis 2%oj. Per regularo pri kriztempaj deprenoj estas nuligitaj familiaj aldonpagoj por edzinoj, ne havantaj infanojn ĝis 16-a, resp. 18-a jara aĝo kaj reduktitaj la familiaj aldonpagoj entute.

5) La plej lasta malbonigo estas elpago de kvarona monata salajro en junio 1933-a anstataŭ mono per obligacioj de ŝtata vojkonstrua prunto (prezo de obligacio 20 lat.) kaj deviga unusemajna libertempo sen salajro, en kiu helpe de oficistaj organizaĵoj oni sukcesis anstataŭi libertempon per nomitaj obligacioj je kvarono de monata salajro. Depost 1-a de junio 1933-a ne plu estas pagata la familia aldonpago al edzinoj, sendepende de tio ĉu ili havas, aŭ ne, prizorgatajn infanojn.

Efektive la obligaciojn oni ricevas ne por kvarona salajro, sed laŭ cifero de tiu kvarono pli, aŭ malpli. Ekz. oficisto de 13-a kategorio post forkalkulo de ĉiuj deprenoj devus ricevi monate lat. 120,24, kvarono de tiu sumo estas lat. 30,06 kaj

la resto post unu 20-lata obligacio estas lat. 10,06, pli ol duono kaj li ricevas per obligacioj 40 lat., do ne kvaronon, sed preskaŭ trionon.

Per tiu vico da malplibonigoj la salajro de latvaj p.t.t.-istoj estas reduktitaj je 20—30%oj. Tiun perdon iom kompensas la falo de vivkareco, sed konsiderante, ke la salajroj neniam atingis vivnivelon, ili ankoraŭ restas sub vivnivelo je 5—10%oj.

ANONCOJ

POŝTMARKOJN po pecoj kaj po serioj kaj bezonaĵojn por ili en granda elekto, kun malaltaj prezoj rekomendas

Evald Eichenthal

Tallinn, Estonio, Kuninga 6. Katalogoj senpage.

„Heroldo de Esperanto“,

la ĉefa Esp. gazeto informas vin pri ĉio en Esp. mondo. Pri abonkondiĉoj informiĝu ĉe Esp. agantoj kaj -organizaĵoj, aŭ rekte ĉe la administracio. Adr.: Heroldo de Esp., Brüsseler Str. 94, Köln, Germ.

Esperanto-Rondo de p. t. t.-istoj „ERPO“

en Tallinn kolektas ĉiajn sciigojn pri Esp. rilate poŝton, kiel: poŝtaj eldonaĵoj kun Esp. teksto, sciigoj kaj aranĝoj pri p. t. t. kaj ilia personaro rilte Esperanton k. t. p. k. t. p. Informojn adresu al: J. Vahtkerl, Koidu 26—2, Tallinn, Estonio.

KUNLABORANTOJ! Traduku el „La Intelrigilo“,

menciante aŭkaŭ la devon. Tiel vi uzas Esp. praktike, samtempe ankaŭ propagandante ĝin, Sciigu ankaŭ al „La Interligilo“ la nomojn de gazetoj, en kiuj aperis tradukoj kaj titolojn de aperintaj artikoloj.

Il. p. kartojn deziras interŝanĝi s-ro Paul Sonberg, Postkontor, Valk, Estonio.

Ĉiujn **Estonajn poŝtmarkojn** vi ricevos (ankaŭ po grande) plej utile de s-ro J. Kūbar, Ahju t. 5, Tallinn, Estonio. Korespondas: esperante, germane, angle.

ENHAVO:

Estiĝo de la Estona Respubliko	98	Estiĝo de Estonaj p. stampiloj kaj p. markoj	107
Estona P.T.T. Historio, organizo kaj statistiko	100	Esp. ĉe p. t. t.-istoj en Estonio	111
P. t. t.-ista faka organizaĵo en Estonio	103	15-jara datreveno de p. t. t. en Latvio	112
Iom pri stato de Estonaj p. t. t.-istoj	105	Organizaĵo de l' Latvaj p. t. t.-istoj	114
Ĉefa p. t. t.-ejo en Tallinn	106	Materiala stato de p. t. t.-istoj en Latvio	114

TELEGRAFAJ KODOJ

TELEGRAFEN-SCHLÜSSEL-BÜCHER

TELEGRAPH AND CABLE CODES

CODICI TELEGRAFICI

CLAVES TELEGRÁFICAS

AĈETADO KAJ VENDADO
de ĉiuj ekzistantaj telegrafaj kodoj.

La agentejo zorgas pri la
REDAKTADO, TRADUKO
kaj TRANSENDO

de la telegramoj verkitaj en ĈIUJ
TELEGRAFKODOJ.

Ni akceptas plenumi la sendadon
de kablogramoj al ĉiuj partoj
de l' mondo.

WE BUY AND SELL
all existing Telegraphic Codes

We code, decode
and despatch messages in
ALL telegraphic codes

EVERY CODE for which there
is a commercial demand
carried in stock.

We despatch cablegrams to any
part in the world.

COMPRA e VENDITA
di tutti i CODICI TELEGRAFICI
in uso.

L'Agenzia s'incaria della
REDAZIONE, TRADUZIONE
e TRASMISSIONE

dei telegrammi redatti a mezzo di
TUTTI i CODICI TELEGRAFICI.

L'Agenzia s'incaria
della spedizione dei Codici in
tutte le parti del mondo.

ACHAT ET VENTE
de tous Codes Télégraphiques
existants

L'Agence se charge de la
GEDACTION, TRADUCTION
et de la TRANSMISSION
des Télégrammes rédigés en TOUS
CODES télégraphiques.

Nous nous chargeons de l'expédition
des Câbles dans toutes les
parties du monde.

Wir KAUFEN und WERKAUFEN
alles existierenden Telegrafien-
Schlüssel-Bücher (-Codes).
Wir übernehmen die Redaktions-
Entzifferungen als auch
Beförderung von überseeischen
Telegrammen abgefasst in
verschiedenen Codes.

Wir verschiffen Codes nach
allen Weltteilen.

COMPRA y VENTA de
TODAS las CLAVES Telegráficas

La Agencia se ocupa de
REDACTAR, TRADUCIR
y TRANSMITIR

los Telegramas redactados
en TODAS LAS CLAVES
TELEGRAFICAS

Nosotros nos encargamos de la
expedición de cablegramas
para cualquier parte del Mundo.

CODES TÉLÉGRAPHIQUES

35, Rue Marbeuf, 35 - PARIS-8^e

R. C. Seine 427.766

Télégr.: Rapidunin-Paris

DJ

ques
la
ION
N
TOUS
S.
xpédi-
es les

UFEN
afen-
es).
ctions-
schen
in
ach

e
ráficas
de
IR

dos
ES

de la
nas
undo.

1-Paris

